

- **Koncize: Informoj & Libroj / - Agendo 21 & Demokratio / - Rememor-Tagoj & Jaroj / - Atomenergio**
- **Energio, shparado, kreado, transporto (energia aspekto)**
- **Ekologio, naturprotektado & konfliktoj pri energio kaj resursoj & klimato & homfaritaj katastrofoj**
- **Agrikulturo, Nutrado, Sano / - Ekonomio, Financoj, Impostoj**

Ekoturisma Vortaro, (2011) Esperanto-chehha-germana-franca-angla
60 paghoj, (60 g), 11,5x16,5 cm, 5,70 Euroj, ISBN 978-80-87169-26-1
<http://kava-pech.cz/book-Ekoturisma%20vortaroe-esperanto.html>

Plano B (2009), aŭtoro Lester R. Brown, worldwatch institute, "Plan 3.0" (2008)
Mobilizo por savi civilizacion - multaj informoj pri la situacio kaj eblecoj.
Prezo: 18 Euroj, eldonita de SAT, ISBN 978-2-918053-01-9

Kien la Klimato (2011) serio pri klimato-politiko, de MAS: <http://www.mas-eo.org>

2011-08-17 **Mondvojaĝo** de francaj esperantistoj, kiu montras krom la beleco de nia mondo, ankaŭ mediajn kaj socialajn problemojn - subtitoligita en Esperanto (Ginette Martin): www.everyoneweb.fr/portraitdeplanete/

--- Agendo 21 & Demokratio & Politiko ---

Nova Movado por daurigebla vivostilo: "Transition Towns"

Transirantaj urboj, kie la dependeco de la nafto reduktighas:

(en) <http://www.transitionnetwork.org>

(de) <http://www.transition-initiativen.de>

pri la urbo Bielefeld (de): <http://www.ttbielefeld.de>

Retejoj pri **Esperanto en Afriko**:

UEA - Afrika Komisiono: <http://www.uea.org>

Burundo - agado de J. Derks: <http://www.esperanto-burundo.webs.com/apps/profile/67578490/>

Pri Burundo k.a.: <http://esp-evoluo.tk/>

Tanzanio: - subtenita de AVE (mw): <http://www.kono.be/Mazingira/>

Tanzania: - alia projekto: <http://www.changamano.org>

Togo: <http://homepage2.nifty.com/Esperanto/ESPTogo/Togobazo.html>

Togo: <http://www.eenschoolintogo.nl>

Pri kooperativa kaj organika agrikulturo en Afriko: <http://www.globidar.org/globe/solidareco.htm>

- Rememor-Tagoj & Jaroj

2011-09-27, Globala tago de trouzado (World Overshoot Day).

Ek de tiu dato ni - teranoj - uzas pli de la tutmondaj produktoj ol la Tero provizas por ni. Komprenoble estas grandaj diferencoj rilate la diversaj landoj, sociaj tavoloj (au klasoj); sed ankaŭ rilate la diversajn varojn kiuj ni prenas de la grundo au de la maroj. Jen pli en diversaj lingvoj:

(de, en, es, fr, it) <http://www.footprintnetwork.org>

(informo laŭ European Green Party Newsletter)

- Energio, shparado, kreado

Uzi LED kaj shpari energion:

<http://umweltinstitut.org/fragen--antworten/energie/rohstoffe/led-938.html>

Stoki ventoenergien per hidrogeno - jen informo kun filmeto:

<http://peranto.posterous.com/vento-en-la-fuelujo>

- Atomenergio

Informoj pri radiado kaj atomenergio (en Austrio): <http://plage.cc/>

Bioniko en la muzeo: www.lwl.org

Intershangha borso najbareca: frents.com

Atentu la altigitan radioaktivecon kiam oni shanghas la brul-stangojn de reaktoro.

Char tiam la kamentubo de la atom-centralo emisias multe pli altan kvanton da radioaktivaj isotopoj.

Ekz-e da Jodo-131 estas la duono kaj da radioaktivaj noblaj gasoj estas triono de la tut-jara emisio. Certe tio sekvigas altigitan kancerriskon - aparte je infanoj.

Normale oni ricevas nur averagajn mezur-valorojn dum la tuta jaro.
(laŭ ARD Plusminus 2011-06-21, kaj la datenoj de la AKW Gundremmingen)
kaj detale esplorita de Dr. A. Koerblein (de, en) <http://www.umweltinstitut.org>

2011-12 **Ne al uranio-minado en Tanzanio !**

Anthony Lyamunda prelegadas en Germanio pri la minado de uranio en Tanzanio*.
Li estas membro de CESOPE kiu engaghighas por la rajtoj de la homoj kaj protekti la naturon.
Ĉar la prezo por uranio altiĝas oni serĉas tutmonde novajn kushejojn, kaj trovis ilin ankaŭ en meza kaj suda Tanzanio, en la regiono Bahi kaj en la Selous Besto-protektejo, proksime al la limo al Malavio.
En Tanzanio aktivas filialo de ROSATOM. ankaŭ Germanio ankoraŭ bezonas uranion malgraŭ la planita finado de la atomenergio.
Aparta problemo estas, ke la lando estas socialisma, kaj ne ekzistas privata land-posedaĵo; tial la homoj ne havas formalan rajtojn jure protesti. Kaj politikistoj kaj oficistoj povas esti koruptataj.
krome temas pri nova afero, pri kiu plejmulto de la parlamentanoj ne kompetentas, kaj emas kredi al la promesoj pri 3%a kotizo laŭ la produktado, kaj laborlokoj.
Studajho de la universitato de Dodoma (TZ) kaj de aŭstralia spertulo, kiun subtenis la oficejo de Heinrich-Boell-Fonduso en Nairobi*, montris ke la entute gajno por Tanzanio estos ch. 44 milionoj da Euroj, sed aliflanke la agrikultura produktajho (ktp) en la du koncernaj regionoj estas chiuĵare pli ol 100 milionoj.
Protestas regionaj CSO-oj (civil-sociaj organizaĵoj / NRO-oj) kiel
CESOPE (Civil Education is the Solution for Poverty and Environment) kaj
FEMAPO (Foundation for Environmental Management and Campaign Against Poverty)

- Bahi: kiam estas malseka jaroj oni plantas rizon kaj ankaŭ bredas fiŝojn, dum la sekaj tempoj oni kolektas salon kaj kultivas grenon. Laŭ la informoj el aliaj urani-minejaj regionoj, kiel Aŭstralio, Nigero, Gabun, Namibio kaj Sudaŭstralo oni scias, ke la prilaborado de la erco kaŭzos poluon de la akvo, grundakvo kaj kiam estas seka - la polvo distribuos la restantan radioaktivecon kaj ankaŭ la venenan uranion (sendepende de la isotopa tipo).
Akvo en tiu regiono povas enhavi nature uranion, ghi estas malmulte, sed per la prilaborado ghi multighos.
- Selous Besto-Protektejo, UNESKO jam protestis, ĉar ghi apartenas al la Mondheredaĵoj, sed la registaro (oficistoj) preferas gajni profiton el la minado.

*) invitita de tanzania-network kaj <http://www.uranium-network.org>
<http://www.boell.de/worldwide/africa/africa-4355.aspx>
(en, kun multaj aliaj ligoj) <http://www.femapo.org>
ret-adreso de CESOPE: <cesopetz@gmail.com>

Pollando planas eniri en la atomenergien ! Strange.

Mi preferus ke PL investus tiun monon en evoluado de propra industrio de alternativaj energioj.
Polaj verduloj kontraŭas elfosadon da uranio: <http://www.zieloni2004.pl/art-4398.htm>
Kaj jen iliaj argumentoj pri alternativa energio-politiko: <http://www.zieloni2004.pl/art-4416.htm>
(de) http://www.bmu.de/atomenergie_sicherheit/doc/47821.php
(de, en) <http://www.umweltinstitut.org/akw-polen>

2011-11-07 Francio: Fessenheim, unu el la la plej malnovaj francaj atomreaktoroj denove aktiva.
Malgraŭ tio ke la streĉo-testo ne esitis finita, kaj la postulita plifirmigo de la fundamenta plato ne estis konstruita. Trinacia asocio por protekti kontraŭ la atom-minacado protestis.
http://www.atomschutzverband.ch/Wiederinbetriebnahme_Fessenheim.html

Naturmedia Instituto en Munkeno mezuris **altan radioaktivecon en sudbavariaj fungoj** - pro la atomkatastrofo de Ĉernobilo 1986.
Bruna boleto (de: Maronenroehrling) Cs-137: la plej alta valoro estis 2500 Bq/kg (Oktobro 2011)
Tiaj fungoj aparte bone kolektas Cezion.
(<http://www.umweltinstitut.org>)

Japanio: la registaro taksas 20 mSv/jare kiel tolerebla eĉ por junaj infanoj; en Germanio tiu-ĉi 20 mSv/jare estas la maksimuma valoro por homoj kiuj profesie laboras en radioaktiva areo.
Intertempe oni montras mezureblajn kvantojn da Stroncio eĉ en Yokohama kaj Plutonio en distanco de 80 km de Fukushima. Oni planas purigi granda areon, 8000 km² (do, 90 km * 90 km) pere de formeto de 5 cm de la grundo. Sed oni ne scias kien meti tiun amaso da radioaktiva grundo.
Fukushima: pluraj fisio-produktoj eliris tuj post la tertremo.
Jam antaŭ la cunamo eliris radioaktiva Ksenono **Xe-133** el kelkaj reaktoroj.
Tio konfirmas la ideon, ke la reaktoroj estis detruitaj jam de la tertremo. La kalkulia kvanto estis 16 700 PBq (Peta Bekerele) Peta = 10¹⁵ (biliardo). Tio estas pli ol duoblo de la elsendo en Ĉernobilo. La duondaŭro estas nur 5,25 tagoj - do, rapide disfalas beta-radiante, kaj ighas Cs-133 kio estas stabila elemento. Tamen se oni enspiras ghin, ghi radias en la korpo. Inter la 12a kaj 20a de Marto pro la hidrogen-eksplodoj estis elsenditaj grandaj kvantoj da radioaktiva kaj san-danghera **Cezio-137**, kiuj grandparte falis per la pluvo al la tereno de Honshu/Japanio, kaj ankaŭ en la maron. Tiu-ĉi kvanto egalas al ch. 40% de tiu el la reaktoro 4 de Ĉernobilo.
Pli ĉe: <http://www.ipnw.de>, (dank al Franz Alt, 2011-10-30 (de) <http://www.Sonnenseite.com> - Fukushima)

2011-08 Civitanoj en Japanio mem mezuras la radioaktivecon, ĉar la registaro ne sufiĉe amplekse informas. La japanoj ne plu kredas ke atomenergio povas esti mastrumata sufiĉe sekure, kaj preferas alternativojn. Jen intervjuo kun Wataru Iwata, membro de la civitana iniciativo CRMS en Fukushima.
La japana parlamento diskutas EEG-leghon (Energio-Enmeto-Leghon), kiu garantios definitan pagon por kurento el regajneblaj resursoj: (en) <http://www.ifandp.com/article/0013199.html>

2011-07 **Radioaktiveco en nutraĵoj ĉirkaŭ Japanio:**

Fine de Aprilo oni kaptis malgrandajn balenojn - 650 km nord-oriente de Fukushima: ilia viando montris altigitan radioaktivecon de ĉ. 30 Bq/kg; ankaŭ en fiŝoj oni mezuris altan kvanton da Cezio.
Oni ne rajtas kapti fiŝojn aŭ aliajn marajn produktojn en 30-km-a zono ĉirkaŭ Fukushima. En Julio oni trovis bovovivandon enhavante ĉ. 3-6-oble pli alta radioaktiveco ol oficiale akceptita por manghajho.
Ankaŭ sur la grundo de la maro troviĝas radoaktiva Cezio kaj Stroncio; ĉar el la reaktoroj elfluas radioaktiva akvo - kiu estis uzata por malvarmigi la fanditan amason el la brul-stangoj (kiuj enhavas la tutan gamon da radioaktivaj produktoj - kiuj parte estas solveblaj en akvo.
Intertempe en japanio funkcias nur 16 el la 54 atomreaktoroj. Pro tio la registaro instigas ŝpari elektran energion kaj instali alternativajn rimedojn.
Jen kelkaj ret-ligoj, vidu ankaŭ ĉe Vikipedio, ktp.:
(en, jp) http://english.kyodonews.jp/news/japan_nuclear_crisis/
(en) http://fukushima.grs.de/sites/default/files/Environmental_effect_20110629.pdf
(de, en pri la balenoj) <http://www.oceancare.org/de/pressecenter/2011/07/iwc63.php>
<http://fukushima.grs.de/informationen-zur-lage-den-japanischen-kernkraftwerken-fukushima-onagawa-und-tokai>

2011-08-26 **Gorleben** (norda Germanio) , eslorejo por subtera stokadejo en salaj tavoloj; sed nuntempe surfaca stokadejo por radioaktiva rubaĵo en norda Germanio:
La mezurado de la neutrona radiado je la ekstera barilo atingis la permesitan lim-valoron de 0,3 mSv (dum unu jaro)*. La stokejo estas planita por 400 "kastoroj" (specialaj ujoj por alt-radioaktiva materialo), nun staras tie ĉ. 100, kaj jam oni atingis la lim-valoron. Oni diskutas iajn ŝanĝojn por redukti la radiadon el la fermita stokejo al la ekstero.

*) Baza informo el Vikipedio pri **siverto**: La efektiva dozo de natura radiado multe varias laŭloke, sed tipa valoro estas 2,4 mSv/jaro . La maksimale permesita jara dozo por laboristoj en radioaktiva ĉirkaŭaĵo (atomreaktoroj, rentgenadao) estis fiksita al 20 mSv (do, 20 mSv/jare); post Fukushima en Japanio oni decidis ke tiu dozo ankaŭ validu ankaŭ por infanoj (lernantoj). Sed tion kritikis multaj kiel tro alta.
Neutrona radiado estas same danĝera kiel alfa-radiado. Ĉar la neutronoj estas malofte bremsataj dum la flugo, ili povas facile trairi ankaŭ murojn. Nur kiam ili rektre trafas hidrogen-atomon, originas surloka radiado. Por milita celo oni inventis la neutronan bombon, kies militcela "avantagho" estus, ke ĝi nur mortigas la vivantaron, sed ne postlasas gravan radioaktivan poluon kiel la aliaj atombomboj.

Dimanĉo 2011-06-26 Fessenheim, Alsaco, Granda **germana-franca-svisa manifestacio** ĉirkaŭ la atomcentralo (de 1977). Krom la aĝo ĝi situas en ter-trema regiono; la arealo estas 1 m malpli alta ol la Rejno-kanalo, kiu povas kazi inundon. La daŭra leghe akceptita emisio de radioaktivaj isotopoj minacas la sanon de miliono da homoj en la ĉirkaŭo de 60 km.

Germanio ĵus decidis - post moratorio - **ke la 7 plej malnovaj atomreaktoroj ne plu laboros**. Tio signifos, ke ili estos malkonstruataj dum jardeko. Ankorau ne okazis decido kiom longe rajtas funkcii la restantaj 4 - supozeble ĝhis 2021.

Svisio ĵus decidis finadon de la atomenergio. Unu post la alia oni malŝaltos la reaktorojn ĝhis ĉ. 2034.

Jen intervjuo kun Mycle Schneider pri la aktuala atomenergio-politiko en Francio kaj Germanio.

Sur la pagharo ankaŭ troviĝas pluraj ligoj al la teknikaj kaj financaj detaloj. (2011-06)

<http://www.gef.eu/news/interview-with-mycle-schneider-nuclear-energy-consultant-on-the-future-for-nuclear/>

Arbaroj kaj Ventoenergio:

Bone, ke en Hindio oni konstruas pli kaj pli da ventoradoj. Sed sen-resopondece. Kiam estas arbaro necesas pli altaj turoj por la ventogeneratoroj, kaj certe je tiu areo necesas forhaki arbojn, kie staros la turoj kaj kie oni devus meti la gigantan grupon por konstruado kaj ebla riparado. Krome necesas taksu la influon ĉefe al birdoj kaj vespertoj. Mi vivas apud la Nigra Arbaro kaj tie necesas haltigi la ventoradojn kiam estas varmetaj someraj noktoj kiam flugas vespertoj, ili estas minacataj de la aer-suĉo de la ventoradaj flugiloj.

Ĉinaj investoroj en suda Hindio, Kude, oriente de Mumbaj, (Andhra Lake Wind Farm) lasis forhaki la pluarbaron grandaree por konstruigi grandan ventorado-parkon. La kamparanoj vivas kun la arbaro kaj tiu provizas ilin per nutrado kaj trinkakvo. Necesus pli limigita konstruado.

Atentu: la registaroj kune kun NRO-oj devas zorgi, ke la konstruado de energio-instalajhoj ne kaŭzu grandarean detruon de la natura medio pere de gigantaj barlagoj, gigantaj subĉielaj fosajhoj por bruna karbo aŭ uranio, forhakado de pluarbaroj por oleo-palmoj aŭ por venotradoj.

Tio signifas, ke la homaro devas limigi sian detruan influadon iomete. Se ne, ni segadas la branchon sur kiu ni - simio-posteuloj - devas sidi. (Iau R. Hörig, taz, 2011-06-22, p.5)

Ekologio, naturprotektado & konfliktoj pri energio kaj resursoj & klimato & homfaritaj katastrofoj

2011-12-18 **Italio murdas tra-migrantajn birdojn.**

La flandra Birdoprotekta asocio dankis al tiuj kiuj protestis kontraŭ la mortigado da tra-migrantaj birdoj. Fakte la nordaj provincoj im malpermesis la chasadon, sed intertempe denove permesis.

La EU-komisaro pri medio plendas, sed devus pli rigore aktivi.

https://docs.google.com/document/d/1PemwzLvsy1e2tH7lx6alXI89TEIc7udLb0_9C402tLk/edit

2011 en Italio oni denove mortpafas migrantajn birdojn !

Italioj, bonvolu helpi fini tiun "tradicion" kiu estas same arkaika kiel la "virbova mortigo" en Hispanio.

Ne temas pri provizo de nutraĵo (kiel eble antaŭ 10 000 jaroj), sed pri sangfluigema ludo.

Jen filmo en la belga organizo por protekti la birdojn (dank' al Leo):

http://www.vogelbescherming.be/site/index.php?option=com_content&view=article&id=593:trekvogelslacting-in-noord-italie&catid=14:persberichten&Itemid=105

Grekio: Protekti la arbarojn kaj mar-testudojn !

Grupo da natur-protektantoj re-arbarigis la regionojn kie estis la grandaj arbar-fajroj dum Augusto 2009. Kaj aktuale ili sekurigas la ovo-metejojn de maraj testudoj, ĉar homoj emas rapide veturi laŭlonge de la marbordo - kaj detruas la ovojn. Same ili forsendas hundojn, kiuj elfosus la ovojn.

(gr) <http://www.o-lapithas.org>

2011-12-08, **Mekong-rivero.** Feliche la koncernataj registaroj laŭlonge de la Mekong-rivero decidis halti la plandaon kaj pli detale esplori la postsekvojn de gigantaj bar-digoj, unue Xayaburi, kiujn ili planis por produkti kurenton. Dankon de la Civil-Socia Organizo "Internaciaj Riveroj" al ĉiuj kiuj protestis kontraŭ tiu plano:

2011-11-04 Bonvolu subteni la konservadon de Mekong rivero.

En Laos oni planas 11 grandaj barlagoj laŭlonge de la Mekong-rivero. La unua estus Xayburi Digo en la nordo de Laos. La regionaj registaroj prokrastis la decidon dank' al multaj protestoj; sed la minaco restas.

La Mekong havas unikan vivantaron. Ĝi akvumas grandan areon da rizo. Oni lernis de multaj bardigoj, ekz-e de tiuj je la Amu Daja, la Nasser en Egipto, kiu plenighadas de shtonaro kaj grundamasoj, ke ili minacas la sekvan regionon. Ame Trandem petas vin subskribi:

Tie vi ankaŭ trovos ligon al la regionaj lingvoj de: khmer, laos, thaj kaj vjetnama

<http://internationalrivers.org/>

2011-09 **Irano**, arestoj pro "verda" aktiveco (vidu ankaŭ pli sube)

La unuan fojon en Irano okazis kelkaj arestoj de gejunuloj kiuj seroize protestis kontraŭ la senakvigon de la **Lago Urumia**, kaj malatento de respondeculoj kaj parlamentanoj !

Dum pasintaj tagoj okazis surstrataj seriozaj protestoj (precipe en du urboj okcidentaj) kontraŭ preterpaso de parlamento.

Kelkaj manifestaciantoj estis arestitaj, kiom ne estas klara ĝhis nun. Ni deziras baldauan re-liberighon por ili, kaj sukceson por ilia agado. (de Fatemeh)

Komento AVE/mw: Bedaurinde ankaŭ en aliaj landoj (Chinio, Rusio,...) homoj estis arestitaj pro protestoj kontraŭ ekologiaj kaj socialaj damaghoj.

2011-08 la surfaco de la Lago Urumia (Orumiyeh) en nord-okcidenta Irano duonighis.

Salo regas - birdoj mortas - homoj suferas - registaro eble agados.

Dank al Fatemeh ni ricevis pliajn informojn pri la srto de tiu lago, kiu situas inter Tabriz kaj Urmia.

Iam tie paŭzis miloj da migrantaj birdoj, sed nun ili malaperas, aŭ mortas pro la salo.

Oni konstruis 7 barlagojn je kelkaj el la pluraj riveroj kiuj nutris tiun sen-eliran malprofundan lagon. Tial falis la akvo-nivelo je kelkaj metroj kaj la saleco altighis al simila valoro kiel en la Morta Maro.

Oni konstruis ponton por rekte ligi Urmia kaj Tabriz, sed pro konstruado de barajho por la plej granda parto de la "ponto", la lago esais kvazau dispartita en du partojn. La barlagoj kaj la barajho kaj eble ankaŭ la redukto de la pluvo-kvanto sekvigis, ke la antaŭa ekologie valora lago ighis minaco por birdoj, bestoj kaj ankaŭ por la regiona agrikulturo, ĉar la salo enpenetras la grundakvan tavolon.

La registaro fermis la oficejon de naturprotektanta organizajho por mutigi la protestojn; sed tamen homoj helpas la birdojn ellavante la salon el la plumoj; kaj en la proksimeco ili kreis novan malprofundan lagon kiel alternativo por la migrantaj birdoj. Fortaj ventoj povas forblovi la salon, kiu poste ghenas la agrikulturon, aŭ rapidigas la degeladon de glacheroj de la ĉirkauantaj montoj.

Estas simila sorto kiel je la Aral-Mar, kaj plia malbona ekzemplo ke la arogo de la registaroj detruas la ekologian bazon de nia vivo. Multlingvaj informoj trovighas ankaŭ en wikipedia.org (Urmia).

Poste mi metos malgrandan dokumentadon kun la fotoj sur nian retejon. Jen filmeto de germana TV de la fino de 2010: <http://www.tagesschau.de/ausland/weltspiegel316.html>

2011-09-07 Naturprotektantoj protektas ankaŭ la **arbo-skarabojn** (bostriko):

En la Bohemia Arbaro estas granda naturparko ambaŭflanke de la limo. Aparte la piceoj estas tre atakitaj de tiaj skaraboj kiuj vivas sub la arbo-shelo. Sed tiuj skaraboj ankaŭ atakas la piceojn ekster la naturprotektita-zono. Tio kaŭzas grandan damaghojn al la forstistoj. La problemo estas ke ne temas pri natura arbaro sed de

picea forsto - do, monokulturo, plantita nur pro la lignoproduktado. Kiam la Verduloj estis en la registara koalicio, 2007, ilia mediodirigisto Martin Bursik decidis lasi la arbojn kiujn faligis granda uragano Kyrrill por kreski tie pra-arbaro. Intertempe, dank al pluvado ekas la natura ekvilibro, ĉar arbo-fungoj kaj aliaj parazitaj mortigas la skarabojn. Eble oni sukcesos havi bufrozonon inter la protektita arbaro kaj la forstoj, kaj espereble ankau la forstoj estos pli bone miksitaj por esti rezistemaj kontraŭ skarabo-atakoj, ĉar birdoj ankau ŝatas la skarabojn. (laŭ Sascha Mostyn, taz, 2011-08-24, p.5)

Ankau la **trofishado** pere de modernaj metodoj kaj gigantaj retoj endanĝerigas la estontecon de la vivado en la maroj. Krome ĝi detruas la ekonomian bazon de miliono da malgrandaj fishistoj, kiuj kutime respondece laboris por ne detrui la proprajn ŝancojn. Do, mangi malpli da fishoj - au tute neniujn, kion konsilas la vegetaranoj - kaj nur akcepti fishojn kiuj estas kaptitaj sub la reguloj de MSC (Marine Stewardship Council): <http://www.MSC.org>, (laŭ Natur & Kosmos 2011/9)
Por trovi pli da informoj: serĉu: Fische, Fukushima, ktp.: (de) <http://www.sonnenseite.com>

Danubo - Kroatio: Minacas la detruo de unika rivera-sistema pejzaĝo laŭlonge de 111 km: Danubo kaj la alfluantaj riveroj **Drau/Drava kaj Mur** en Kroatio konsistigas unikan pejzaĝon, ĉar ili plejparte troviĝas en sia natura formo, ne-kanaligita. Por evolui la ekonomion de tiu regiono politikistoj opinias, ke reguligo, ktp, necesas.
Kontraŭ tio plendas diversaj NRO-oj: WWF, EuroNatur, Green Osijek, Drava Liga, Kroata Naturprotektita Asocio, ICPDR: <http://www.icpdr.org>
<http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,Zerstoerung+von+Europas+Amazonas+geplant,6,a19484.html>
(laŭ WWF kaj Sonnenseite de Franz Alt, 2011-06-21)

Militoj kaj ekologio & sano

2011-07-09 Germanoj: Bonvolu subskribi postulon de "Handicap International" al germanaj politikistoj por plene respekti la **Traktaton de Oslo** - malpermesi grapobombojn. La germana parlamento devus decidi por legi kiu malpermesas al la germanaj bankoj investi - ankau eksterlande - en tiajn firmaojn.
(de) <http://www.streubomben.de/>, (en, es, fr) <http://www.stopclustermunitions.org/>

2011 **Minoj: postmilita mortigado, kripligado kaj permilita naturdetruo:**

La Konvencio de Genevo pri la protekto de Opfer de militoj ricevis amendo-protokolon #39:
Ĝi malpermesas kazi daŭrajn damaĝojn al la natura medio. Sed fakte tio ofte ne estas respektata. Ekz-e pro la milito en Afganio estis forbrulitaj arbaroj kaj frukt-ĝardenoj - ofte por forpreni kashlokojn - la malnova taktiko de "forbruligita lando".
Pro la forbruligado de arbaroj la erozio plifortigas, kaj la lando dezertigas. Alia kromefiko signifas minacon de la sovaghaj bestoj, ĉar la homoj fuĝas pli alten kaj ofte chasas bestojn.
En Vjetnamio la usonaj trupoj venenigis la arbaron pere de sen-foliigencoj, ekz-e "Agent Orange"; kiuj pro la apartenantaj dioksinoj ankau kazu multajn mortajn au kripligitajn infanojn.
En Irako kaj dum la milito pro la Kosovo Usono (k.a.) utiligis obusojn kiuj enhavis malrichigitan uranion - ĝi ankoraŭ enhavis radioaktivan uranion kaj tiu elemento de si mem estas venena. Tiuj obusoj pro la alta pezo de uranio pli bone detruas armitajn tankojn; sed la uranio pulvorigas kaj envenas en la pulmojn.
Alia atako kiu eĉ minacas post la milito estas la diversaj minoj (eksploziloj). Grandaj kontraŭveturiloj kaj malgrandaj, aparte la milionoj el eksplozivilaj obusoj - grapobomboj. De tiaj multaj restas aktivaj dum longa tempo kaj malpermesas normalan vivon au detruas sovaghajn bestojn. Forpreni la minojn estas malfacila kaj multekosta tasko, kiun la milit-partioj kutime ne pagas, kaj ankau ne la firmaoj kiuj produktas ilin. Multaj ŝtatoj ratifis la koncernajn traktatojn (de Ottawa kaj Oslo), sed bedaŭrinde ankoraŭ ne tiuj senrespondecaj ŝtatoj: Brazilo, P.R.Chinio, Hindio, Israelo, Pakistano, Rusio, Usono, kiuj produktas kaj uzas tiajn post-militajn mortigilojn. Aparte fiaj ili estas kiam ili aspektas infan-ludiloj, kiuj kripligas infanojn. Germanio ankoraŭ permesas specialajn minojn kiuj 100%e detruigas dum mallonga tempo.
SAT-anoj instigas la sindikatojn de la koncernaj landoj haltigi la produktadon kaj uzadon almenaŭ de kontraŭ-homaj minoj. Malofte tiaj minigitaj zonoj - kaj inter-limaj zonoj - kreas paradizon por sovaghaj bestoj kaj plantoj, ĉar la homo ne plu ghas tie. (parte laŭ natur+kosmos, 2011/07)

Klimato

2011-12 Klimatokongreso en Durban (Komento de Herrmann Deceuninck)
(eo) <http://eo-naturamikaro.webnode.nl/>

"Importo" de forcejgasaj emisioj

Kioto: La aktuala proceduro trovi tutmondan limigon de la karbondioksida emisio (eligo) ĝhis nun ne sukcesis, malgraŭ daŭra konferencado. Sed intertempe oni lernis plian efikon: la importitan CO₂-emision:
La industriigitaj landoj ja importas multajn varojn, fabrikatajn kaj krudajn (metaloj), ĝhis produktado kazu emisio da CO₂ kaj CH₄ (metano), ekz-e je bovo-bredado, forbruligo da pluv-arbaroj por kulturi sojon, majzon kaj oleo-palmojn. Tia produktado devas eniri en la tutmondajn forcejgasajn bilancojn, kaj tiel la bilanco por la industriigitaj landoj malplibonigos. (laŭ Yvo de Boer, taz, 2011-06-16, p.3)

2011-08-28 La **arkta glacio** degelas pli rapide, CO2 acidigas la maran akvon.

La areo de la glacia surfaco chirkau la Norda Poluso je Septembro-mezo reduktighas jam dum pluraj jaroj, same dum 2010 (pri 2011 ni atendu). Kaj la degelado de super-grunda glacio-tavoloj kiel en Grenlando kaj Antarkto kausas la altigon de la mara nivelo chiu jare je 3 milimetroj.

Alia grava afero por la maro estas, ke la hom-kauzita emisio da CO2 pliighas, kaj tio parte solvighas en la marakvo, aparte en la malvarma. Tio ghenas multajn akvo-vivulojn, kiuj havas kalkan protektilon kiel konkvoj kaj koraloj - en acideta akvo tio solvighas.

Do, ni devas redukti la bruligadon de fosiliaj nafto kaj gaso, char tio kausas ankoraŭ ne bone komprenataj problemoj. Kelkaj parametroj trovighas je t.n. shanceligha punkto, ghis la punkto ekzistas iu ekvilibro - post tiu punkto la situacio shanghighos draste, kaj estos malfacile reatingi la antaŭan ekvilibron.

Pro tio: ni reduktu nian vivstilon rilate la CO2-emision - malpli estos pli bona.

(lau Mojib Latif, <http://www.sonnenseite.com/Umwelt,Die+Arktis+-+Fruehwarnsystem+fuer+den+Klimawandel,16,a20007.html>)

2011-09 **Arkta ozon-truo**, chijare malplej da ozono en la stratosfera tavolo chirkau alteco da 20 km.

Sciencistoj mezuris 80%-an mankon da ozono en Januaro kaj Februaro de 2011 super la Arkta polusa regiono. Ties areo egalas tion de Germanio, sed certe la randa zono estas multe pli granda.

Tiu ozona tavolo protektas la vivon kontraŭ la damaghajn UV-radiojn. Oni legis pri blindigo de shafoj en la regiono proksime de la Antarkto, char tie la ozon-manko jam estas regula dum la vintroj. Sed en la Arkto antaŭ 2011 ghi estis malpli severa.

Por rememorigi: Ozono estas tri-opa oksigeno O3. Kelkaj gasecaj kemiaĵoj, kiel FCKW (fluoro-kloro-karbonhidrido), uzitaj ekz-e en shpruc-boteloj kaj en fridujoj (kaj nun malpermesitaj) ankoraŭ trovighas en tia alta aer-tavolo. Kiam estas tre malvarma, ghi povas reagi kun tiu O3 - en kvazau eterna reakcio-ciklo. Pro tio ni devas atendi kelkajn jardekojn ghis ili finfine ne plu trovighas tie.

<http://www.nature.com/nature/journal/vaop/ncurrent/full/nature10556.html>

Komento AVE/mw: Ozono en la aertavolo kie ni vivas estas danghera por nia spirsistemo; sed tiuj du tavoloj ne intermiksighas char ozono estas sufiche peza kaj facile detruenda, je kontakto kun aliaj gasoj au kun polvo.

2011-12-04 Informoj pri la **foruzado de resursoj**: (de,en) <http://www.global2000.at>

Pri la 10 plej minacantaj poluantoj/-ajhoj de nia Tero & diversaj raportoj: (en) <http://www.greencross.ch/>

Sandbag Climate Campaign pri maljusta kaj maltauga **uzado de eligo-rajtoj**: (en) <http://www.sandbag.org.uk/> (de) http://www.bund.net/fileadmin/bundnet/pdfs/klima_und_energie/20111105_sandbag_klima_goldesel.pdf

2011-10-09 Apple denove kun **iPhone**, kie la uzanto ne povas mem shanghi la akumulatoron !

Unuflanke la mondo funebras pro la morto de la genia Steve Jobs, aliflanke, necesas kritiki la praktikon de Apple, kaj de aliaj firmaoj kiuj agadas kontraŭ longdaŭra uzado de iliaj aparatoj; ekz-e per fiksa enmeto de baterio, kio ne estas intershanghebila de la uzanto.

(lau Franz Alt, www.sonnenseite.com , www.duh.de)

ps: DUH ofertas reprenon au ech aĉeton de malnovaj mobil-telefonoj, por reuzi ilin au almenaŭ recikli la resursojn optimale. <http://www.handysfuerdieumwelt.de/wirkaufens/>

2011-08 SHELL - ne nur poluas la Nordan Maron per **likanta nafto-ekspluatado** sed ankau - kaj pli terure - grandskale la deltaon de la **rivero Niger**.

Jam dum la lastaj 30 jaroj nafto tie poluas la grundon kaj la akvarojn. Kiu ne plu estas uzebla por agrikulturo kaj fish-kaptado. Krome poluita aero, pro la forbruligo de la "nebezonata" tergaso, kausas malsanojn de la spirsistemoj je homoj kaj bestoj. (lau Franz Alt kaj <http://www.global2000.at>)

Ankau en la Bohai-golfo de la **Flava Maro** poluas granda nafto-liko la maron, tie respondecas la china filialo de Conoco-Phillips. (lau Bad. Ztg. 2011-08-13, p.10)

Germanio: poluado de la aero pro maltauga bruligado de rubaĵoj en uzinoj kiuj produktas cementon kaj en aliaj hejto-centraloj. tion kritikis Baerbel Hoehn, (federacia parlamentanino de la Verduloj).

Tio okazas pli kaj pli pro la devigo ne plu deponi rubaĵon kiu enhavas energion; sed tiaj bruligejoj ne laboras sub la plej altaj teknikaj sistemoj, kiuj povus elimini la eligon de dioksinoj kaj pez-metalaj vaporoj (Hg, Cd).

(lau taz, 2011-08-11, p.9)

2011-08-17 Bonvolu subskribi la alvokon de AVAAZ por

tutmonda protesto kontraŭ la plia forhakado de la Amazonia Pluvarbaro.

La brazila kongreso (parlamento) estas antaŭ decido pri legho kiu reduktus la protekton de unu el niaj tutmondaj pulmoj. La plia redukto de la pluvarbaro havus diversajn malbonajn konsekvencojn:

Indighenaj triboj kaj ankau la tie vivantaj bestoj perdus sian viv-medion.

Tiom granda areo influas la klimaton de pli granda regiono; plia senarbarigo signifus plian dezertigon post pluraj jaroj. Sciencistoj diras ke la Amazonio trovighas antaŭ renversiga punkto: kiam certe elcentaĵo de la pluvarbaro mankas, shanghighos la tutan klimatan sistemon al sekeco.

Ech se oni replantus "utilajn" arbojn tie, tio signifus detruon de funkcia biosfero.

Jam nun la lignajho-industrio dungis murdistojn kaj mortigis plurajn medio-protektantojn. La indighenoj organizas tutlandajn protestojn - ni helpu ilin per nia subskribo. La prezidentino Dilma Rousseff pripensas haltigi la leghon per sia veto - ni subtenu shin per nia subskribo - jam estas pli ol 890.000 da subskriboj - AVAAZ petas ricevi 1 milionon. (14 lingvoj) http://www.avaaz.org/de/save_the_amazon_a/?cl=1230169766&v=9985

- Agrikulturo, Nutrado, Sano

2011-10-30: **Grundo kaj Erozio:** Post legado de libroj pri bontenado de la grundo, kaj de "Plano B" mi kompilis la **AVE-Konsilojn pri agrikulturo** (kiuj kompreneble ne estas kompletaj): <http://www.verduloj.org/dokument.htm>

Mielo en Europo protektita kontraŭ **GMO**-polenoj:

Abelista en Bavario sukcese procesis antaŭ la Europa Justicokortumo ke li ne devas toleri GMO-polenojn en la mielo de liaj abeloj. Tio signifas, ke en lia kazo polenoj de najbara majzo-kampo kie kreskis la majzo MON-810 de Monsanto trovighis en la mielo. Li ne rajtas vendi tian mielon pro eventuala san-risko kaj ĉar en mielo ne rajtas esti ne-konata produkto - en tiu kazo la polenoj kun genetika informo kiu mortigas insektojn. Do, la registaro kiu permesas la prov-kampon (au finfine la Monsanto) devas anstataŭi la damaghton de la abelista. Tio samtempe signifas malpermeson vendi en Europo mielon el landoj kie oni aplikas GMO-plantojn: Argentino, Brazilo, Kanado, Usono kaj aliaj. (taz, 2011-0907, p.1)

La konzerno Bayer kompensas per 750 milionoj USD la perdojn de rizo-kamparanoj en Usono; ĉar GMO-rizo "Liberty Link" krucighis kun aliaj specoj da rizo. (ARD-Tagesschau 2011-07-03) <http://www.tagesschau.de/genreis100.html>

Informo pri **antibiotikoj:**

Kelkfoje la kuracistoj donas al ni antibiotikojn. Kiam iu havas fortan infektaĵon, tiuj substancoj povas salvi rian vivon. Tial estas gravege konservi la efikecon de la antibiotikoj. Ne malofte tamen la kuracistoj donas profilaktan antibiotikon. Ju pli ni uzas iun antibiotikon, des pli ni provokas, ke la patogenoj evoluigas rezistencan kontraŭ tiu antibiotiko. Tial gravas limigi la uzon de iu ajn antibiotiko al kazoj de vera neceseco kaj neniam ilin uzi profylakte. Granda ĉi-rilata problemo estas ankaŭ la kokin-amastenejoj. Pro la situacikondiĉita ĝenerala malsanemo kaj la densegeco de individuoj iuj infektaĵoj facile disvastiĝas. Tial la kokin-amastenistoj kutimas doni antibiotikojn al siaj malliberuloj. Laŭleĝe post ĉiu antibiotikodonado ili devas atendi kelkajn tagojn antaŭ rajti vendi la ovojn. Tamen, ĉar ili senpaŭze donas antibiotikojn, ili ne povas plenumi la leĝon, sed vendas la ovojn plenajn je antibiotikoj. Kaj la aĉetantoj senscie konsumas antibiotikojn. Jen unu kialo el pluraj por neniam manĝi ovojn de amastenataj kokinoj. Foje iu diras, ke ŝima pano estas sana, ĉar ĝi enhavas la antibiotikon penicilinon. Tio estas duobla eraro: Plue al la jam priparolitaj danĝeroj de senkontrola antibiotikouzado, ne veras, ke ŝima pano enhavas penicilinon. Kelkaj ŝimoj el la genro Penicillium ĝin produktas, jes. Sed la tipika panŝimo (ankaŭ en juglandoj) estas Aspergillus flavus, kiu estas patogeno kaj ofte enhavas kancerogenajn aflatoksinojn. Alia afero estas la tiel nomitaj noblaj ŝimoj en kelkaj fromaĝoj: Penicillium camemberti, Penicillium candidum kaj Penicillium roqueforti malgraŭ siaj nomoj ne produktas penicilinon, nek iun toksinon, do (escepte se ni havas laktaĵalergion) ni povas sentime manĝi kaj ĝui tiujn fromaĝojn. (de Gereon Janzing)

- Ekonomio, Financoj, Impostoj

2011-11 okupaciu (**Occupy** Wallstreet): Tiu tutmonda movado ĉefe protestas kontraŭ la malmoraleco de la grandaj banko- kaj financo-konzernoj: Profitojn kaj bonusojn en la propran poshon - malprofitojn pagus la socio.

1. Okupaciu postulas redukti la bankojn tiom, ke ilia krasho ne plu ghenas la tutan socian sistemon. Aparte ni kontraŭas tiajn komercajn operaciojn kiuj nur rilatas al spekulacio, kiel derivatoj; ĉar tiuj estas malbone komprenebla ech de fakuloj. Kaj ni rememoras la fie malghustan taksadon de tiaj institutoj, pro kio multaj naivaj investintoj perdis monon.
2. Spekulacio pri nutrajhoj restu limigita por reala bezono de agrikulturistoj kaj firmaoj.
3. Impostoj de richuloj devas esti pli alta, ĉar ilia richeco dependas i.a. de la socia kunlaboro.
4. Ni postulas la Financan Transakcio-Imposton, por nutri la internaciajn instancojn de UN kiuj garantius pacan kunvivadon sur nia malgrandighinta planedo Tero.

2011-11-14 **Euro**-krizo: Al la germana telvizio ZDF, la germana ĉefministrino Merkel ĵus deklaris:

- "Ni volas gardi eŭron, kune kun ĉiuj landoj kiuj ĝin adoptis. Tamen tio postulas ŝanĝon en la nunaj politikoj kaj pli da Eŭropon".
- "Ni devas doni pli da povojn al Bruselo, kaj inter ili la eblecon interveni kaze ke landoj ne respektu la pakton por la kresko kaj stabileco".
- "Paŝon post paŝo, ni volas pli da Eŭropo. Tio signifas ka EU kaj eŭroareo kune kresku, alimaniere la homoj vere ne kredos ke ni volas transpasi ĉiun obstaklon".
- "Ni devas rekoncepti la ekonomian kaj monan union origine kreitan de la eŭrofondintoj. Ni devas ĝin perfektigi

direkte unue al fiska unio, kaj poste al la politika. Tion lernigis al ni la krizo, Nin atendas grandaj streĉoj kaj peza laboro". (tradukita de J-K rianldo, de la diskutlisto EU-federo: eu-federo@googlegroups.com)

2011-08 financaj problemoj en Euro-lando(j):

*1 Intertempe oni solvis la urghan problemon per t.n. har-tranĉo; la bankoj ktp. lasas 20% de la ŝuldoj, sed aliflanke profitas de pli bona kvalito. Grekio (k.a.) ricevas malplikostajn kreditojn kun longa dauro.

*2 EUropo bezonas integritan financ-sistemon kaj komunajn financpolitikajn regulojn kaj procedurojn por regajni fidindecon.

*3 Ni bezonas kunordigitan imposto-sistemon por eviti truojn. Intertempe pluraj politikistoj (Sarkozy, Merkel) postulas la financ-transakcian imposton almenau en Euro. La pozitiva efiko de la Euro estas tiom granda, ke indas meti ghin al pli stabila bazo.

Informfontoj:

*1 lau John Lanchester, germana versio de LMD Augusto 2011, p.1ff

*2 lau Oliver Landmann, prof-o pri ekonomiko en Freiburg, Der Sonntag, 2011-08-14, p.10

2011-07 Certe chiuj legis pri la financaj krizoj de kelkaj landoj & pri la ne-travidebla agado de "ratingistoj" kiuj hejtigas la spekulacion. Rilate al EU: char la "registaro" de EU ne bone kontrolis la elspezadon de Grekio, ktp, ili nun devas helpi per pli favoraj Euro-kreditoj kaj samtempe per reguligo kiu unue tiras monon de tiuj richuloj kiuj eksportis sian monon, por redukti la elspezojn kaj por plifortigi la ekonomion (ekz-e per malaltaj salajroj). Unu el la kauzoj: Grekio, lau mia informo achetis amase armilojn - sen havi la necesan monon. EU disponis kelkajn miliardojn por investi en Grekio, sed sen kun-financado el Grekio tiu subvencio ne povis esti uzata. *Komento de AVE/mw:* Mi proponas investi en sunenergion; tio donas laborojn kaj dauran rikolton.

Alia afero estas rilate Usono, kiu ankau havas tre altan monton da ŝuldoj. La Republikana Partio malpermesas altigi la impostojn por richuloj; kaj nur postulas redukti la socialajn sekurigajn elspezojn (por la malrichuloj). Prezidento Obama jam komencis redukti la militarajn elspezojn.

Komento de AVE/mw: unuopaj (richaj) homoj ne estas tiom avidaj kiom organizajhoj kaj partioj kiuj reprezentas grupon da homoj.

Financa spekulacio pri nutrajhoj kaj nafto: Nacia Bonstat-Indico

Por richuloj kaj la tutmondaj bank-konzernoj estas profitdona ludo: acheti varojn kiu ne tiom abundas, kaj dank al tia amasa por-estonta achetado la prezoj altighas; se oni ghustatempe "eliras" el la merkato eblas kunporti grandan profiton. Sed dank al tiu profito la varoj - aparte grenoj (kafo,...), nafto kaj kelkaj metaloj - tiuj varoj estas pli multekostaj por la konsumantoj.

Keklfoje tia troa hedghado kausas vorticon, kiu ech voras la profitojn. La tasko estas limigi tian spekuladon por profitemuloj, sed lasi la merkaton por tiuj kiuj bezonas ghin funkcia: agrikulturistoj kaj iliaj kooperativoj, firmaoj kiuj bezonas la varojn. Ili bezonas certecon, ke estonte ili ricevos la varojn.

Jhus la IEA (internacia Energio-Agentejo/Administracio) decidis liberigi je nafto 60 milionojn da bareloj., por eviti plian altighon de la naftoprezo; kiun oni jam spertas & atendas pro la haltigo de ekspluato pro diversaj militoj en Libio, suda Sudano, ktp.. altighantaj prezoj reduktus la ekonomian kreskadon, kion oni bezonas por superi la financajn krizojn (en Usono & suda Euro). Chinio klopodas redukti la kreskadon, sen kauzi financan kolapson. Tio estas malfacila tasko, char tie jam montrighas tro-hejtigita ekonomio - kun astronomiaj prezoj por loghejoj - en la industriaj zonoj. Sed tia eterna kreskado estas ne-daurigebla; la arto fari daurigeblan politikon kiu estas rezist-ebla kontrau ekologiaj, financaj kaj politikaj krizoj.

Nun ekonomiaj sciencistoj pripensas novan indicon, kiu malpli respregulas la kreskon de la materia konsumo, sed montras la felichon kaj dignan bonstaton de la homa kaj natura vivo: NBI (bona ekzemplo: Bhutano) (i.a. lau Felix Lee, taz, 2011-06-22, p. 4)

Financoj - shangho bezonata por Euro

Okaze de la financaj krizoj divers-severaj en pluraj EU-landoj kreighis **komuna transpartia alvoko** por: Redukti la financ-ofican sharghon al labor-salajroj; anstataŭ altigi ghin al enspezoj el kapitalo.

Enkonduki tut-europan imposto-sistemon kiu ebligas preventi la imposto-fraudon*.

Enkonduki Financ-transpagan imposton (origine nomita Tobin-Imposto).

Kontraŭi la privatigon de publikaj servoj, char tio signifas sharghi la socion kun la debetoj kaj plirichigi malmultajn privatulojn. tie jam subskribis multaj - chefe rughaj kaj verdaj politikistoj.

(en 6 europaj lingvoj) <http://www.changeforeurope.eu/>

Komento (mw/AVE): kompreneble la politika klaso trovighas tiom alta super la bazaj bezonoj, ke ili ne vidas la problemojn de homoj kun malalta salajro - kvankam ankau ties laboro gravas por la socio - do:

Mankas ankau la postulo por unu sistemo por baza civitana san-asekuro kaj pensio-sistemo, kiu validas por chiuj; inkluzive oficistoj, managheroj, politikistoj. Ghi devus havi limojn sube kaj supre.

Lau-procenta adaptigo de la pensioj donas maljustan profiton al homoj kiuj havis bonstatan laborpozicion.

Tio jam trovighas en la programo de la Verduloj "Bürgerversicherung", kaj eble ankau de la Socialistoj.

Kaj pli avangarda - kaj malpli facila - programo estas la Baza Enspezo por chiuj; kio estas financata pere de impostoj. *) Impostoj devas esti harmoniigataj almenau en tuta Euro.

Bezonatas internacia kontrolo super la kredit-bazita elspezo-politiko.